



3/2005
Aprilo/Majo

Germana Esperanto-Kongreso 5a ĝis 8a de Majo 2005 en Bad König

Editoraĵoj

Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo*
r. a.
Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg
Tel/Faks: +49 40 250 30 65

Prezidanto: [Jürgen Wulff](#)

Redaktoro: [Benno Klehr](#)

Retpoŝto: [Esperanto-Hamburg](#)

Redaktofino de



n-ro 4/2005: 15-05-2005

Sentenco

pli bone estas,
cruligi kandelon,
anstataŭ lamenti pri mallumo

Konfuceo

Karaj legantoj,

dum la jarĉefkunveno 2005 ni decidis,
proponi al GEA, okazigi la Germanan
Esperanto-Kongreson 2007 en
Hamburg.

Ni eltrovis dum la *Hamburga Somero* en
2003, la kluba jubileo kaj la *Hamburga*
Vintro en 2004, ke ni povas organizi
bone funkciantan teamon, por okazigi
bonan kongreson en Hamburg. Jam nun
ni havas teamon de 12 laboremuloj, kiuj
pretas kunlabori por la kongreso.

Kutime por GEK en iu urbo laboras 5 aŭ
6. Do niaj kondiĉoj estas eksterordinare
bonaj; kaj ni devas esti bonaj laborantoj:
Laŭ tio, kion ni faris dum la pasintaj jaroj,
la kongreso en Hamburg devas esti iom
avantgarda, iom pli bona ol antaŭaj. Nia
klubo havas internacie bonan reputacion,
kaj ni ne risku perdi ĝin pro ia tute
senkolora kongreso. Ni planas iom
forlasi la kutimajn vojojn, kiujn sekvis
germanaj kongresoj dum la pasintaj 50
jaroj. Eble ne estos facile, ke
hamburganoj denove volas fari ion
novan, sed ni ja konas tion...

Benno Klehr

Nia programo

Marto	Majo
<p>31 20.00 h Prelego pri Eŭropa Unio (Hotelo Steigenbergo klubejo fermita)</p> <hr/> <p style="text-align: center;">Aprilo</p> <hr/> <p>3 14-18 h Kurso por progresintoj</p> <p>10 <i>Rudi Haberland:</i> Albumo-Foliumado</p> <p>14 Niaj diapozitivoj</p> <p>21 <i>Hannelore Brunow:</i> Literatura vespero</p> <p>23 14-18 h: Kurso por progresintoj</p> <p>28 18.00 h estrarkunsido 20 h <i>Ralph Glomp:</i> Kanto-Vespero</p>	<p>5 15.00 h Renkontiĝo ĉe U-Horner Rennbahn (promenado) 16.00 h kafo kaj kuko en la klubejo</p> <p>9 Eŭropo-Tago 10-18 h Stando en la urbodoma korto 15.45 h Ralph Glomp kantas ĉe urbodomo</p> <p>12 <i>Hans Fechler:</i> Eine Städtepartnerschaft lebendig gestalten</p> <p>19 <i>Sylvia Pöhlmann:</i> DVD: Infano en Bona Espero (Brazilo)</p> <p>21 14-18 h: Kurso por progresintoj</p> <p>26 <i>Jürgen Wulff:</i> Perretaj konferencoj</p>
<p>Propono</p> <p>Karaj membroj de HES! Dum kelka tempo jam parto de "normala" ekipaĵo de prelegosalonoj estas bild-ĵetilo por prezento komputilajn prezentaĵojn aŭ filmojn. Mi proponas, financi tion per mondonacoj al la kluba kaso kun indiko "bildĵetilo".</p> <p style="text-align: right;"><i>Ralph Glomp</i></p>	

Ĉe-Elle-ir-tago 2005

En la 1960aj kaj 1970aj jaroj estis tradicio en Hamburg, ke Ellen Eggers invitis la klubanojn al kaftrinkado dum ĉielirtago. Oni renkontiĝis antaŭe apud metrostacio kaj promenadis al ŝia loĝejo.

Post kiam la klubo posedas domon, la kafotrinkado okazas en la klubdomo kaj oni renkontiĝas por promeni proksime de la *Esperanto-Arbo* apud metro-stacio Horner Rennbahn, elirejo "Am Gojenboom".

Kursoj en Eppendorf

Komencanta kurso komenciĝis la 1an de Marto, ĉium mardon de la 18:30a horo ĝis la 20:00a horo, 10 semajnojn.

Daŭriga kurso komenciĝis la 28an de Februaro, ĉium lundon de la 18:30a horo ĝis la 20:00a horo, 10 semajnojn.

adreso:

"Eppendorfer Kulturhaus"

Martinistr. 40

20251 Hamburg

Informoj: [Peggy Ley](#)

Solvo de la Enigmo 1/2005

LETERKESTOKISO
KRISTANAUKAZOR
KANTAMAKRAMONE
KREIKOMEDIAMOS
AVEREMITOASERT
FIDELIĜOATUTPO
OPAPILIOJATRAP
FUROROIGNORIRI
ARUMMALRUBEKOL
BOŜMANOKOLTUKO

[Re al Esperanto en Hamburg](#)